



# ESPÉRANTO-NORD

Fédération d'espéranto des régions Nord-Pas-de-Calais & Picardie

PROTOKOLO DE KUNSIDO DE LA FEDERACIA KOMITATO

Dato: 16an de Novembro 2013

Loko: Village de Vacances Stella Maris (okaze de la Eŭropa renkontiĝo)

## Tagordo:

- 1) Venonta federacia kongreso
- 2) Venonta Norda Gazeto
- 3) Ekzamensesioj: KER - ekzamenoj kaj FEI - ekzamenoj
- 4) Vizito de Ĝoja (Zhang Ping), ĉina ĵurnalistino
- 5) Lille 2015
- 6) Venonta Rendevuo de Stella Maris

## Kunvokitoj:

	Ĉeestis	Senkulpiĝis	Ne ĉeestis
Michel Dechy prezidanto (Lil)	X		
France Valet, vicprezidanto (Lil)	X		
Katja Boen, sekretario (Lil)	X		
Xavier Vilain, kasisto (Dun)	X		
Edmond Plutniak (Ar)	X		
Arlette Plutniak, (Ar)	X		
Xavier Dewidehem (Lil)	X		
Claude Longue-Epée (Lil)		X	
Richard Valet (Lil)	X		
Jean Dietrich (Val)	X		
Jacky Ramon (Ar)	X		
Cyrille Decouture (Pik)	X		
Catherine Lévêque (Pik)	X		
Joëlle Muller (Ar)	X		
Thérèse Dequidt (Lil)	X		

15 komitatanoj ĉeestas aŭ estas reprezentataj: la kvorumo estas atingita.

## 1. La venonta federacia kongreso

Kelkaj komitatanoj sin demandas ĉu indas organizi kongreson ĉiujare. La plimulto opinias ke jes. Estos kiel kutime komitatkunsido kaj ĝenerala asembleo matene kaj spektaklo posttagmeze. Bona ideo estus viziti la belan muzeon Louvre-Lens kiun oni povos ĝis fino de 2014 senpage viziti.

Se tion ni elektas, ni devos trovi lokon en la apudeco. Ni pridiskutas la diversajn eblecojn. Ĉu eventuale en Fouquières-lès-Lens (pere de Boris Bouchez kaj lia patro), ĉu en Noeux-les-mines (pere de Jean Hennebert), ĉu pere de la urbestro de Loos-en-Gohelle (sinjoro Jean-François Caron, verdulo kaj vicprezidanto de la Norda Regiono) ? Ni devas esplori la diversajn proponojn. La proponitaj datoj estas la 16a de marto, la 6a de aprilo, aŭ la 13a de aprilo.

## 2. Norda Gazeto

Claude Longue-Épée ŝatus ke la kontribuajoj alvenu akurate. La venonta gazeto aperos komence de januaro, sed la presisto devas havi la dokumenton antaŭ la komenciĝo de la kristnaskaj ferioj.

## 3. Ekzamensesioj

De du jaroj nia federacio organizas kaj KER-Ekzamenojn en Araso, kaj FEI-Ekzamenojn en Lille. Edmond Plutniak klarigas ke estis grandega laboro (sed ankaŭ grandega sukceso!). Pri FEI-Ekzamenoj, Michel Dechy klarigas ke Lille prezentis la duonon de ĉiuj kandidatoj en Francio.

Kiujn ekzamenojn ni organizu en 2014? MD intencas denove organizi la FEI-Ekzamenojn en Lille. La reguloj pri tiuj ekzamenoj iom ŝanĝiĝis kaj nuntempe eblas rekte trapasi la duanivelan ekzamenon sen unue sukcesi la unuanivelan. Pri KER-Ekzamenoj ankoraŭ ne estas decido.

## 4. Vizito de Ĝoja (Zhang Ping), ĉina ĵurnalistino

Klopodoj estis faritaj por ke ŝi estu akceptita en la Konfucius-instituto en Araso (*Ni tamen nun scias ke ŝi ne povos viziti tiun instituton*). Jam estas programo en Lille (vizito de la urbo kun CLE, renkontiĝo kun ĵurnalistoj, kaj prelego pri la nuna Ĉinio).

Katja Boen ŝanĝos la horaron en venonta mesaĝo, ĉar komenci la prelegon je la 20:00 horo estas iom malfrue. Ni do decidis ke la prelego komenciĝos je la 19:30.

## 5. Lille 2015

Xavier Dewidehem klarigas ke komence de Oktobro, li, Julia Hedoux kaj Michel Dechy akceptis Clay Magalhaes, konstanta sekretario de UEA, kaj la 8an de decembro okazos en Parizo kunsido. Estas multaj diversaj taskoj kunorganizotaj. 50/60 homoj sin deklaris pretaj kontribui kaj inter ili proksimume 20 estis invititaj al tiu kunsido kiu okazos en la sidejo de UFE.

UEA nuntempe, dank'al interreto zorgas profesie pri granda parto de la farota laboro, tiel ke nia tasko estos pli malgranda ol ekzemple la tasko de la organizantoj de la kongreso en Montpellier. Ni zorgos inter alie pri amasloĝejoj, prelegoj landtemaj... Komence de decembro ni scios kiu deziras zorgi pri iu aŭ alia kampo.

Michel Dechy parolas pri tio ke infankongreso ne okazis dum la lastaj jaroj. Li klarigas ke li ŝatus organizi tion en Villeneuve d'Ascq kun infanoj de kongresanoj, infanoj de la urbo Villeneuve d'Ascq, kaj junaj volontuloj de Villeneuve d'Ascq kiuj eklernus la lingvon. La ideo estis tre bone akceptita en Villeneuve d'Ascq.

## 6. Venonta Rendevuo de Stella Maris

Arlette kaj Edmond klarigas ke ili intencas daŭrigi la laboron dum kelkaj pliaj jaroj. Nuntempe estas ege malfacile allogi junulojn kaj ĉi-jare aliĝis neniuj junulo. Kiamaniere allogi homojn? XD parolas pri la horaro, eble dimanĉe la programo komenciĝas iom tro frue. Junuloj havas multe da eblecoj, ili eble partoprenas unufoje, aŭ dufoje se oni multe varbas, sed poste elektas aliajn aranĝojn. Eble oni devas lasi la eblecon ne elekti kurson, kaj eble junuloj povus mem organizi la propran programon. Tiu temo estos denove pritraktita dum la venonta komitatokunsido.

*Redaktita de Katja BOEN*